




Go-Amiko

Informilo de
Japana Esperantista Go-Asocio
N-ro 143, Aprilo 2015



Dioj de feliĉo ĝuas go-ludon



En la templo Ŝooten en la gubernio Saitama troviĝas skulptaĵo de go-ludantoj. Tiu ĉi partio baziĝas sur tiu de Honinboo Doosaku kontraŭ Honseki en 1697.

Novjara Go-konkuro en Tokio



La 12an de januaro okazis la novjara Go-konkuro en la sidejo de Oosaki-Go-klubo. Kvin esperantistoj kaj du ne-esperantistoj partoprenis. Ili ekludis je la 10a kaj finis ludi je la 4a. Ili plene ĝuis go-ludon en amika etoso. La rezulto estis
La 1a premio : s-ro Kamijama

Seiĵi (de Ŝizuoka)

La 2a premio : s-ro Anzaŭa (ne-esperantisto)

La 3a premio : s-ro Nakai Cuneo (de Tokio)

Foto : de dekstre, Hori Jasuo, Kamijama Seiĵi, Niŝio Harutaka, Sakurai Nobuo, Nakata (ne-esperantisto) kaj Nakai Cuneo (sidanta)

Ŝerco fariĝis reala

Kamijama Seiĵi

« Morgaŭ mi iros al Tokio por partopreni en la esperantista go-kunsido. Mi fariĝos la ĉampiono », mi ŝerce diris al miaj go-amikoj en la klubo de la urbo Atami. Surprize la ŝerco fariĝis reala.

Mi loĝas en la apartamento en la varmofonta urbo Atami, fama pro la plej frua florado de umeo kaj la plej malfrua koloriĝo de aŭtunaj folioj. Preskaŭ ĉiun tagon mi ludas go-on kaj legas libron de estimata s-ro Okada Mokiĉi. Inter la instruoj de Okada jenaj estas tre utilaj ankaŭ por go-ludado. « Ne provu venki, sed akceptu malvenkon » kaj « Ne provu grandigi, sed provu ne malgrandigi ».

En la esperantista go-kunsido en Tokio partoprenis 7 homoj, do ĉiuj luktis kontraŭ ĉiuj. Mi unue ludis kontraŭ s-ro Sakurai, la plej forta go-ludanto inter ni. Antaŭe mi ne povis venki lin, eĉ havante avantaĝon de 9 ŝtonoj, sed laŭ la regulo mi devis ludi kun avantaĝo de nur 8 ŝtonoj. Feliĉe, dank' al la libro por go-komencantoj, kiun mi ĵus komencis legi, kaj dank' al la instruoj de s-ro Okada mi venkis.

En la dua ludo mi malvenkis, havante avantaĝon de 6 ŝtonoj. Post la tagmanĝo mi venkadis kontraŭ 4 homoj, kun kiuj mi havis avantaĝon de 4, 5 kaj 6 ŝtonoj. Do fine mi venkis kontraŭ 5 homoj kaj malvenkis kontraŭ 1 homo, kaj efektiviĝis mia revo fariĝi la ĉampiono.


En la fermo mi ricevis premion de la ĉampiono. Mi dankas al s-ro Hori, la prezidanto de JEGA, kaj s-ro Sakurai, kiu zorgis pri tiu kunsido.

Adiaŭante ĉiujn, mi tranoktis en la hotelo en Tokio kun mia edzino kaj festante la venkon, mi trinkis pli multe da biero ol kutime. Reveninte al Atami, mi raportis pri mia venko en la klubo kaj gustumis la premian kukon kun miaj amikoj.

Kamijama Seĵi

413-0016 5-5 Minakuĉi-ĉoo, Atami-ŝi, Ŝisuoka-ken, Japanio,
Berkrel 401

La problemo 239



Nigro havas meton. Trovu rimedon por mortigi la blankan ŝtonaron.

(La solvo estas en la 15a paĝo)

Pripenso pri la funebro de GO Sei-Gen

Ger HANSSEN



Go Sei-Gen forpasis en la aĝo de 100 jaroj la 30an de novembro 2014. Li naskiĝis la 12an de junio 1914 en la provinco Fujian en Ĉinio. Li estis adepto de Segoe Kensaku. Li estis la plej forta en la epoko de Ŝooŭa en Japanio kaj estis nomata « Go-sankutulo de Ŝooŭa ». Li kreis novan formacion kun Kitani Minoru.

En interreto mi ofte uzas kromnomon "goseiger". Mi ofte ŝerce aldonas la rimarkon: "Mi jam longe volas samesti

GO Sei-Gen, sed mi ĉesis meze de la lasta litero."

Tiun nomon mi ne mem elpensis. Ĝi devenas de mia partopreno en radioprogramo en 1988. Oni ankoraŭ povas trovi informojn pri tiu programo en interreto (en Nederlande kompreneble). Ĝi nomiĝas "Avondspits" (verspera pinto) kaj en tiu programo estis programero nomita "Kruip in de huid van..." (rampu en la haŭto de...).

En tiu ĉi programero homoj partoprenis por klopodo de samesti iu persono, kiuj ili admiras. Mi pripensis partopreni. Fakte mi admiras la goludon si mem. Ĉu mi vere admiras iun goludanton? Jes, mi admiras goludanton. Li estas *GO Sei-Gen*. Sed mi preskaŭ nenion sciis pri li. Tamen mi sendis leteron. En tiuj tempoj retmesaĝoj ankoraŭ ne ekzistis. Kaj poste de kelkaj semajnoj mi aŭdis, ke la programo volas ĉesi. Tuj mi ricevas leteron, ke mi povas partopreni je iu sabato. Daŭras iom ĝis mi eltrovis, ke tio estos la plej lasta de la elsendaĵoj.

Mi estis tre nervoza. Precipe ĉar mi partoprenis en turniro je tiu tago en mia propra klubejo. Mi informis la radioprogramon pri tio, sed ne estas problemo. Ili nur bezonis telefonnumeron por atingi min. Dum partio, kiu mi ludis kontraŭ *Niek van DIEPEN*, mi estis informita ke estis telefonalkvoko de la radio. Kompreneble mi interrompis la partion kaj mi partoprenis la programeron.

En tiuj tagoj estis amatora 4-dana ludantino nomita *SHIMIZU Kishiko*, kiu tiutempe loĝis en Nederlando. Mi aŭdis, ke ŝi estis go-lernanto de *GO Sei-Gen*. Mi certis, ke ŝi estis demandita por fari la demandojn. Tio certe ne helpis al trankviligi min.

Mi atingis la telefonon kaj la radioprogramero komenciĝis. La unuaj 4 demandoj ne estis tre malfacilaj. Mi fartis bone. Sed la lasta estis tre iom konfuza. Mi ne plu rememoras tre bone, sed la demando estis pri iu majstro de *GO Sei-Gen* dum liaj junaj jaroj. Tio kompreneble estas *SEGOE Kensaku*. Sed mi ankaŭ legis pri iu persono, en kiu domo li loĝis dum tiu periodo. Mi menciis tiun nomon.

Post tio sekvis longan silenton. Ĉu estas ĝusta? Mi rapide pripensis, ke ili volis aŭdi la nomon de *SEGOE*. Kio okazos? Finfine estis ĝoja bruo. Mia respondo estis ĝustigita! Nu, la tradicio de la programo nun postulis, ke mi ekde tiam parolis kiel esti *GO Sei-Gen*. Sed mia nervozeco tiel disbalancigis min, ke mi parolis kiel mi mem. Estis tre konfuza.



(Ventumilo kun kaligrafiaĵo de Go Seigen)

Poste mi reiris al mia ĉesita partio por fini ĝin. Mia kontraŭulo diris al mi: Hodiaŭ mi ludis kontraŭ *Go Sei-Gen*. Vi devas scii, ke mia propra nomo estas *Ger*. Sed estas fakto, ke mi tre ofte volis samesti *GO Sei-Gen*, sed mi neniam eĉ estis proksima.

Letero de Germanio

La 12an de februaro 2015

Matthias Reimann

Osteröder Str. 13, 99762 Neustadt, Germanio
<esperanto-suedharz@gmx.de>

Jam de kelka tempo mi posedas "Go-Amiko"-n n-ro 142, kiun Vi sendis al mi. Koregan dankon kaj mi tre pardonpetas, ke mi nur nun skribas. Je la jarfino kaj komence de la nova jaro estis multaj familiaj aferoj kaj mi neglektis mian tutan korespondadon.

S-ro Sakurai jam skribis al mi pri la ŝanĝo en la estraro de JEGA kaj mi tre gratulas al vi kiel nuna estro/reprezentanto.

Ekde 2004 mi gvidas/aranĝas Interretajn Esperantistajn Go-Turnirojn (dufoje po jaro) sur KGS-servilo. En la lastaj jaroj mi de tempo al tempo sendis sufiĉe interesajn (laŭ mi) partiojn al s-ro Sakurai por komento kaj publikigo en la "Go-Amiko". Eble Vi vidis ilin. Estu ankaŭ varbado por niaj interretaj turniroj. Kiel fari en estonteco?

Mi hodiaŭ sendis leteron al s-ro Sakurai kun partio el la lasta turniro. Estas 5-ŝtona-handikap-partio inter "Cortex" (d-ro Christoph Klawe / D) kaj "russ" (Russ Williams / PL) ludita je la 2014-12-14. Vi trovu ĝin en la aldonaĵo (CR 1...4). Ĉu Vi povas malfermi ilin? Ĉu mi sendu partiojn por "Go-Amiko" rekte al Vi? Ĉu Vi mem farus komentojn? Mi tre ĝojus pri publikigo kaj kelkaj vortoj, ke oni povas ludi E-turniroj sur KGS. Mia account tie estas "esgo". Kiu ŝatas partopreni, skribu al mi (aŭ al mia retadreso).

Cetere kelkaj vortoj pri mi: 60-jaraĝa, mi laboras kiel mezur-inĝeniero, mia edzino kiel disponento* en cigaredfirmao. Mi ludas goon ekde 1981, bedaŭrinde nur kiel 5-a kjuo. Esperanto ankaŭ ekde tiu tempo. Pro manko de tempo mi nur tre malofte partoprenas en E-renkontiĝoj. Ni havas 36-jaraĝan filinon kun 3 genepoj kaj 30-jaraĝan filon. Nia filino loĝas nur 14 kilometrojn for de ni. Neustadt estas

situanta en la mezo de Germanujo en la iama orienta parto. Vi certe trovos ĝin sur iu mapo en interreto.



Vidu foton faritan dum vizito de geedzoj Sakurai en 2011 ĉe mia hejmo. Mi staras apud s-ino Sakurai. Dekstre estas Ger Hanssen el Nederlando, la plej forta go-esperantisto el Eŭropo.

<https://www.flickr.com/photos/30787964@N07/6042071868/in/set-72157627306535381>

En mia flickr-account "esgo747" vi ankoraŭ trovos aliajn fotojn de mia edzino, genepoj, filino kaj bofilo kaj poŝtmarkoj kaj kaj.....

Kun tre koraj salutoj, Via Matthias Reimann
Kara Jasuo,

*Mi skribis la germanan profesio-esprimon "disponento". Verŝajne devus esti "disponisto". Ŝi disponas (ŝi estas respondeca por) materialojn por la produktado de cigaredoj. Ja ne nur estas tabako en la cigaredo, oni bezonas multajn aliajn partojn kiel skatoloj, paperoj, gluaĵoj, folioj




Hieraŭ ni festis en familia rondo la Pasko-feston. La infanoj (niaj genepoj) serĉis pasko-ovojn (kaj aliajn donacetojn), poste ni kune tagmanĝis. Nia filino Suzanne kun sia familio nur loĝas 13 km for, sed nia filo venis el Kiel en Nordgermanujo (400 km for). (La 6an de aprilo 2015)

* En la sekvaj paĝoj aperos komento pri la partio menciita supre. S-ro Sakurai faris ĝin.


El 1a KGS 2014

N.Sakurai


Oni prezentas partion bone luditan inter russ (Russ Williams el Pollando) kaj Cortex (D-ro Christoph Klawe el Germanio) en la XXI-a KGS 2014 kun koncizaj komentoj. Estas 5-ŝtona handikap-partio kaj Cortex havis blankon. Dia. 1-a. Ekde la komenco la metoj de ambaŭ montras




Dia. 1-a. 40 metoj (1-40)



Dia. 2-a. 40 metoj (41-80)



Dia. 3-a. 40 metoj (81-120)



Dia. 4-a. 40 metoj (121-160)

bonan ekzemplon kiel 5-ŝtonan handikap-partion. La fluo de la ŝtonoj estas natura kvazaŭ river-fluo.


Dia. 2-a. Ankaŭ en ĉi tiu fazo la fluo de la ŝtonoj sekvas naturan river-fluon. Blanko aktivis kaj Nigro obeeme akceptas postulojn de Blanko kaj tamen neniel perdiĝas la avantaĝo de la 5-ŝtona handikapo. Jen la potenco de 5 ŝtonoj!

Dia. 3-a. Sekvas konsekvencaj metoj. B-37 estas akra, sed Nigro ne ŝanceliĝas kaj sekvas ankaŭ je naturaj metoj oferante du ŝtonojn kiel ĝis N-40.


Dia. 4-a. La partio eniras en la finan stadion sen granda konflikto. Ŝajnas al mi ke la fina aranĝado de la ludo estas ne tre facila por ambaŭ ludantoj. Interŝanĝo de B-11 kaj N-12 estas malavantaĝo por Blanko. N-14 estas meto de nur 4 poentoj. B-15 estas multe pli granda kaj Nigro devis ligi tie ĉe la meto N-14. N-30 estas malgrava, ĉe la meto Nigro devis rapidi ĉe la punkto maldekstra de B-35 sekvige.

Dia. 5-a. B-4 estas pli bona ol B-1. La punkto dekstra de B-19 estas pli bona ol N-16. B-19 estas saĝa meto.

Dia. 6-a. Kvankam ankoraŭ kelkaj komentindaj punktoj estas, mi lasas kaj finas. Nigro gajnis la partion je 11 poentoj. La partio pruvas la potencon de la handikapaj metoj.



Dia. 5-a. 20 metoj (161-180)



Dia. 6-a. 20 metoj (181-200)

Leteroj de Rusio

La 5an de decembro 2014

Roman Efremov javaharlalneru@mail.ru (meze en la foto)



Mi ĵus ricevis vian leteron kun la nova kajero de "Go-amiko". Koran dankon pro tio! Estas tre agrable legi ĝin kaj vidi konatajn vizaĝojn sur la fotoj, la ĵurnalo vere iĝis pli interesa kaj informoplena.

Gratulojn al vi okaze de via estriĝo en JEGA ! Mi bondeziras al vi sukcesojn ĉe tiu posteno. Bonvolu transdoni miajn elkorajn salutojn al sinjoro Sakurai kaj bondeziroj de sano kaj longa vivo.

Mia ludnivelo poiome kreskas, nun mi estas 13 kju. Antaŭ unu monato mi partoprenis dutagan turniron en la urbo Ijevsk kaj sukcesis gajni la 1-an pozicion en la 3-a grupo (inter ludantoj malpli fortaj ol 11 kju). Ĉi-semajnofine (la 6-7 de decembro) mi partoprenos ankaŭ alian regionan turniron en la urbo Perm. Mi provos poste verki artikolon por "Go-amiko" pri tiuj turniroj kaj ĝenerale pri go-vivo en Rusio.

Krom tio mi partoprenas go-turniron inter esperantistoj en la retejo KGS, sed dume havas malbonan rezulton tie (0-3). En la pasinta turniro tie mi havis 3-2.

La argentinanino Soraya Alvarez, kiun ni instruis ludi Goon dum la UK en 2014, iĝis mia bona amikino. Ni ofte korespondas, kaj ŝi daŭre lernas la ludon. Fojfoje ŝi petas mian konsilon, kaj mi helpas ŝin. Mi montris al ŝi kelkajn skanitajn paĝojn de la libro "Fundamento de taktiko kaj strategio..." kaj nun ŝi volas mendi ĝin.

Go en Rusio

La 8an de februaro 2015 Roman Efremov javaharlalneru@mail.ru

Pardonu pro mia malfrua respondo. Mi promesis al vi skribi iom pri la turniroj, kie mi ludis, kaj ĝenerale pri go-ludo en Rusio.



Decembre mi veturis al la urbo Perm kaj partoprenis la “Malferman pokalon de Perma provinco”. Tio estis regiona turniro, ne tre granda (ĉirkaŭ 20 ludantoj). Por mi estis vere interesa sperto - ludi kun novaj rivaloj kaj ĝenerale konatiĝi kun aliaj go-ŝatantoj de najbara regiono, kiujn mi ankoraŭ ne konis. La unua partio estis iom mirinda – mi ludis kontraŭ 7-jara knabo kaj malgajnis. Evidentiĝis, ke lia patro estas sufiĉe forta ludanto kaj trejnisto, kaj li instruas sian filon ludi ekde lia 3-jara aĝo. Do tiu knabo estas multe pli sperta ol mi, kaj verŝajne mi ne sukcesis plene koncentriĝi ludante kontraŭ infano – li mortigis unu mian ligon en angulo kaj gajnis la partion je proksimume 20 poentoj. Antaŭ la turniro tiu knabo havis kvalifikon 14 kju, sed reale li ludas pli forte.

Poste mi ludis ankoraŭ unu partion kun infano – 8-jara amiko de mia unua rivalo kaj lernanto de la sama trejnisto. Li havas 11 kju en la oficiala Rusia kvalifikaro kaj 6 kju en KGS. Li pasigis la partion strategie pli bone ol mi kaj devis venki, sed eraris en la fino: kiam mi jam ne esperis venki kaj aranĝis la lastan “atakon de senespero”, li neatendite perdis bezonatan okulon kaj mi sukcesis mortigi lian grandan ligon. Li tuj ekploris, kaj mi devis trankviligi lin, ja li estas nur infano malgraŭ sufiĉe alta lud-nivelo. Tri aliajn partiojn mi ludis kontraŭ plenkreskuloj kaj ĉiujn gajnis. Ĝenerale mi finis la turniron neatendite sukcese – kun 4 venkoj en 5 partioj kaj okupis la 2-an pozicion en la tria grupo (inter la ludantoj malpli fortaj ol 11 kju).

Fine de januaro mi veturis al alia najbara urbo – Iĵevsk kaj ludis en la turniro kun handikapŝtonoj. Depende de la diverseco inter lud-niveletoj malpli forta ludanto en ĉiu partio havis handikapŝtonojn. Se la diverseco estis pli granda ol 9 niveletoj, partio komenciĝis kun 9 ŝtonoj kaj Nigro havis po 10 kromajn poentojn pro ĉiu plia kju (dan) de la diverseco. La lastan partion - la plej amuzan – mi ludis kontraŭ tre forta ludanto (4 dan), havante 15 ŝtonojn de handikapo (9 verajn ŝtonojn kaj 60 kromajn poentojn). Kiam li senokuligis mian grandan grupon, mi jam opiniis la partion perdita, sed poste mi sukcesis distranĉi liajn ligojn kaj aranĝi grandan kaptokonkuron (*semeai*). Finfine mi pli akurate kalkulis la spirpunktojn, gajnis tiun *semeai* kaj revivigis mian grupon, kiu ne havis okulojn. Mia oponento rezignis, ĉar la pozicio sur tabulo estis proksimume egala, kaj 60 kromajn poentojn li neniel povus gajni. En aliaj partioj mi ludis kun diversaj ludantoj – kaj pli fortaj, kaj malpli fortaj ol mi. Kun 4 venkoj en 5 partioj mi okupis la 3-an pozicion en la tuta turniro kaj plialtigis mian kvalifikon ĝis 11 kju.

En Rusio go-ludo estas oficiale agnoskita kiel speco de sporto. Ĝenerale la nivel-sistemo en ĉiuj sport-specoj estas tia: ekzistas 3 sport-gradoj (3,2,1 laŭ kresko), la sekva nivelo estas “kandidato por majstriĝo” kaj poste “majstro de sporto”. Por plej altklasaj sportistoj ekzistas du specialaj gradoj – “internacia majstro de sporto” kaj “honora

majstro de sporto”. En go-ludo la 3-a grado egalas al 11 kju (do, nun mi povas taksi min kiel sportiston ☺), la 2-a = 7 kju, la 1-a = 3 kju, kandidato por majstriĝo = 1-2 dan kaj necesas okupi premian pozicion en regiona turniro, majstro de sporto = 3-4 dan kaj necesas okupi premian pozicion en tut-Rusia turniro. La nivel-liston de ludantoj gvidas la Rusia Go-federacio (<http://gofederation.ru/>) – oficiala organizo de rusiaj go-ludantoj. Laŭ ĝia datumbazo dum la pasinta jaro en diversaj urboj de la lando okazis ĉirkaŭ 250 oficialaj turniroj.



Kompreneble go-ludo en Rusio estas amatora. En la tuta lando estas nur 2 profesiuloj, kiuj studis en Koreio – Aleksandr Dinerŝtejn kaj Svetlana Ŝikŝina. Sed ekzistas ankaŭ kelkaj dekoj da fortuloj (6-7 dan amatora), kiuj ludas egale kun la

profesiuloj. Ĝenerale en la listo de RGF nun estas pli ol 3500 diversnivela ludantoj. En ĉiuj grandaj urboj ekzistas go-kluboj, kiujn gvidas spertaj instruistoj, ofte eĉ po kelkaj kluboj en la urbo. Somere fojfoje estas aranĝataj eksterubraj tendaroj, kie partoprenantoj ludas goon ĉe bela naturo. Infanoj ofte interesiĝas pri la ludo kaj komencas ludi kun fervoro, sed kreskante ili ofte forlasas la ludon kaj okupas sin pri aliaj hobiaj. Tamen mi kredas, ke ĝenerale go-skolo en Rusio estas sufiĉe forta, unu el la plej fortaj inter Eŭropaj landoj. Dum la Tutmondaj Intelektaj Ludoj la teamo de Eŭropo ofte konsistas nur el rusaj ludantoj.

La historio de serioza go-ludado en Rusio estas sufiĉe mallonga – nur 50 jaroj. En 1965 aperis la unua klubo en Leningrado (nuna Sankt-Peterburgo), la unua neoficiala ĉampionato de Sovet-Unio okazis en 1977, la unuaj Pokalo kaj Ĉampionato de Rusio – en 1985, la Sovetia Go-federacio aperis en 1989. Kompreneble, niaj tradicioj en goo ne

estas tiom fortaj kaj antikvaj, kiel en orient-aziaj landoj, sed go en Rusio evoluas tre rapide, rusaj ludantoj havas sukcesojn en internaciaj amatoraj turniroj, kaj mi esperas, ke en estonteco Rusio povos iĝi vere forta lando en la internacia go-movado. Tion povas helpi internacia kulturŝanĝo kaj lernado ĉe Japanio kaj Koreio. En la jaro 2014 Koreio kaj Rusio reciproke nuligis vizojn, kaj tio vere povas helpi al pli oftaj vojaĝoj kaj interŝanĝo de sperto inter niaj landoj. Bedaŭrinde pro la nuna politika situacio la Japana registaro rezignis moligi kaj simpligi vizan reĝimon kun Rusio (oni ja havis planojn pri tio), do nun por rusoj estas malfacile akiri japanan vizon kaj viziti Japanion. Tamen kiel esperantisto mi kredas je baldaŭa paciĝo kaj amikiĝo de ĉiuj landoj, kaj espereble iam ankaŭ mi vojaĝos al Japanio kaj ludos goon kun vi. ☺

Letero de Germanio

La 28an de novembro 2014 **Christoph Klawe** c.klawe@web.de

Hodiaŭ bone alvenis la nova ekzemplero de la „Go-amiko“. Mi pensas, ke vi unua eldono estas bela sukceso - gratulojn! Plaĉas al mi la miksaĵo el raportetoj kaj go-problemoj. Volonte mi pagos la kotizon de 10 € al via konto. Kiu estas la nomo de via UEA-konto? Mi nun definitive scias, ke mi povos partopreni la venontan UK en Lille, kaj volonte mi helpos instrui la go-ludon tie. Mi ankaŭ pretas kontakti la lokan go-klubon tie. Tiamaniere ni eventuale sukcesos atentigi ne-esperantistojn pri Esperanto kaj renkontiĝos interesajn kunludantojn por bonaj partioj. Kion vi pensas pri tiu ideo? Kopie mi sendas tiun ĉi mesaĝon al Matthias Reimann, motoro de la esperantista go-movado en Germanio. Alia demando: ĉu vi ŝatus ludi partion per normala letero? Saman mi faras kun s-ro Sakurai, bela plezuro por ni ambaŭ...

La solvo 239-a

Nigro povas mortigi la blankan ŝtonaron.

Fig. 1-a. (La solvo) N-1 sinĵeto estas la solvo. Bonorde estas unue sinĵeti kaj igi Blankon forkapti tion kaj due ŝtonmeti sur vitalan punkton, N-3.




Fig. 1-a




Fig. 2-a




Fig. 3-a

Fig. 2-a kaj 3-a. (La varioj) Se Blanko sinligas kiel B-2, Nigro falsigas la blankan okulon per minacanta meto N-3, kiu nomiĝas Japane ‘MAKURI’ (refaldi).

Fig. 4-a. (Malsukceso) Oni volus ŝtonmeti la duoblan minacon N-1, sed Blanko sinligas la maldekstran ŝtonon per B-2, kaj faras okulon sur la punkto supre de B-2.

Nigro ne povas malhelpi tion.




Fig. 4-a




Fig. 5-a




Fig. 6-a

Fig. 5-a. (Malbona met-ordo) Certe N-1 estas unu el la vitalaj punktoj, sed tiukaze malpli urĝa ol la sinĵeto en la fig. 1-a.

Fig. 6-a. (Malbona met-ordo) Se Nigro unue metas la tuŝ-meton N-1, Blanko sinligas solide ĉe la dekstra vaka punkto kiel B-2 kaj faras okulon ĉe la spuro de N-1.

JEGA 八ヶ岳囲碁合宿のお知らせ

(Go-kurso en Jacugatake-Esperanto-Domo)

日時： 2015年5月23日(土) 14:00 – 5月24日(日) 11:00

Dato: la 23a de majo 2015 (sabato) 14:00 – la 24a de majo (dimanĉo) 11:00

場所： 八ヶ岳エスペラント館 (電話 03-3491-1349)

(中央線小淵沢で小海線に乗り換え一つ目の駅甲斐小泉駅下車徒歩 10 分)

Kursejo: Jacugatake-Esperanto-Domo

会費： 3000円(食事別)

Kotizo: 3000 enoj (30 eŭroj)

申し込み： メール：horizonto@water.sannet.ne.jp 電話・ファックス:027-253-2524
などで堀泰雄まで、申し込んでください。

Aliĝo: al HORI Jasuo horizonto@water.sannet.ne.jp

2015年度会費の納入をお願いします。会費は1000円です。振替用紙を同封した封筒を受け取った方が対象者です。入っていない人は、既に払い込んであります。

Japana Esperantista Go-Asocio (JEGA) fondiĝis en la jaro 1979 kiel organizo de japanaj esperantistaj go-amantoj kaj subtenanto de Esperantista Go-Ligo Internacia, kiu celas disvastigi goon per Esperanto kaj Esperanton per goo.



Japana Esperantista Go-Asocio (JEGA) 日本エスペランチスト囲碁協会

Esperantista Go-Ligo Internacia (EGLI) 世界エスペランチスト囲碁協会

UEA-konto: egli-f

ホームページ: <http://jega.shisyuu.com/jega/index.html>

連絡先: 2-13-3 Ootone, Maebaŝi, Gunma, Japanio, 371-0825, Japanio Ĉe HORI Jasuo

371-0825 群馬県前橋市大和町2-13-3 堀泰雄方

メール:horizonto@water.sannet.ne.jp 電話:027-253-2524